

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

Januari 1944

32 årg. Nr 1

ORGAN FÖR SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

VINTRA KONFERENCO – VARMA AKCEPTO



Grupo de konferencanoj: En la plej supra vico oni vidas s-ojn Kihiberg k Backlund meze flanke de la aparato, sube s-ojn Norling, Uppsala, Szilágyi, Fristad, k Ragnar, Norrköping (n-roj 2, 5, 8 de maldekstre), plej dekstre sube sidas s-ino Kuld-Leijder apud s-ro Malmgren, sube s-roj Stridell, Sandarne, Nicolausen, Sthlm, Nilsson k Fernström, Häl-singborg, Lindén k Morariu (de mald. 3, 5—7, 10, 12), sube s-ro Engholm, Ludvika, f-ino Andersson, Kungsgården (de mald. n-roj 3, 7), plej mals. s-roj Vilkki, Turner, Bengtsson, Krylbo, Nylén, Åhström, Gävle (de mald. n-roj 1, 2, 4, 9, 12).

Kiam oni la unuan fojon aŭdis pri la plano de tiu ĉi konferenco, kies temo estis la pacproblemoj koncerne la popolojn ĉirkaŭ la Balta Maro, oni estis skeptika. Ĉu la eksperimento povos esti sukcesa? La rezulto brile pravigis la entreprenemulojn, la du organizojn, SEF kaj IEL, kiuj respondis por la aranĝo, kaj la "motoron" de la konferenco, s-ron Ernfrid Malmgren, sen kies optimisma energio la aranĝo certe ne estus povinta atingi la realiĝon. Kaj tian realiĝon!

Oni komencu laŭ la vico de la aferoj. La 5-an de januaro centoj da partoprenantoj kolektiĝis en la Stokholma Altlernejo; jam antaŭ la komenco de la pritraktadoj oni povis senti, ke mem tiu ĉi vigla intereso — meze de la vintro kaj profunde en la milito — signifos unikan travivaĵon. La partoprenantoj venis el ĉiu direkto. 30 lokoj estis reprezentataj kaj la dek eksterlandanoj reprezentis sep naciojn. Responde al tiu vigleco oni aŭdis dum la konferenco unike interesan prelegserion pri la jasmenciata

temkomplekso, oni havis okazon veni en senperan kontakton al diversaj vidpunktoj, kelkfoje kontrastaj, sed ĉiam interesaj, pri kiuj la prezidanto, s-ro Malmgren, deklaris, ke neniu el ili povos esti konsiderata kiel oficiala aŭ deviga vidpunkto de la esperantistaro, aŭ tiu de la aranĝantaj organizoj.

En siaj salutvortoj s-ro Malmgren dediĉis varmajn vortojn al la memoro de nia Majstro, kies hejmlando, vivverko, la sorto de lia popolo estas en vere solida rilato al la temaro de la konferenco kaj al la sentoj de ĉiu konferenca partoprenanto. Prezertante la prelegontojn li speciale salutis rektoron J. Vilkki, kiu alvenis rekte el eksterlando, el la militanta Finnlando.

Red. S. Backlund.

La unua prelego okazis en la sveda lingvo. Red. S. Backlund prelegis en sugesta, verva kaj elokventa maniero pri la temo: Östersjöstaternas behov av ömsesidig hjälp. Li komencis sian valoran pritraktadon per la analizo "de la voĉdono de ŝtato en internaciaj aferoj", kiam

unu persono devas doni kategorian jesan, aŭ nean voĉon koncerne komplikan problemon, aŭ eĉ problemaron de la interŝtata kunvivo. En tiaj decidoj ankaŭ malgranda nacio povas havi gravegan kaj valoran rolon, speciale se ĝian voĉon fortigas la harmonia volo de la popolo. — En interesa analizo li karakterizis la ĝeneralajn trajtojn de le sveda publika opinio koncerne internaciajn problemojn, la sintenon kaj senton de svedoj, kiuj opozicie reagas pri agoj, direktigantaj kontraŭ la libero de alia popolo. Li faris paralelon pri la reago de la sveda publiko al la unua kaj dua militoj de Finlando kaj devenigis tiun reagon el la instinkta liberamo kaj ord-amo de la sveda popolo. La preleganto donis historian rerigardon. Ke la sorto de la ĉirkaŭbaltikaj landoj eĥas tiel forte en la animo de la svedoj, tio havas sian kaŭzon i.a. en historiaj okazaĵoj, kiuj kontaktigis solide tiujn landojn al la formiĝo de la sveda sorto. Kiam oni okupas sin pri la ŝancoj kaj deziroj de tiuj malgrandaj popoloj, neniu rajtas pensi, ke la deziro pri la serioza pritraktado de la koncernaj problemoj povas esti direktata kontraŭ grandpotenco, ĉar la konvenaj solvoj servas same la intereson de la grandaj ŝtatoj, kiel tiun de la malgrandaj. La libero de la malgrandaj popoloj estas komuna intereso. Post tio sekvis pritrakto de la lingva problemo. Li rakontis, ke dum lia funkciado en Genevo la kunlaboro inter la reprezentantoj de la ĉirkaŭbaltikaj ŝtatoj nebligis ĝuste pro la manko de vera kaj facile akirebla scio de internacia lingvo, kiun rolon nek la angla, nek alia nacia lingvo povas plenumi. Li mem hontis pri la snobismo de siaj samlandanoj, kiuj rifuzis reformon, tiel ege gravan por la lando.

La esperanta movado venku sian modestan sintenon, oni konsideru mem la gravecon de sia propra afero kaj faru la necesajn paŝojn por la gravigo de la ideo en la vivo de la baltikaj ŝtatoj kaj oni faru tiurilate proponon al la grandpotencoj. Ne temas pri tio, ke oni akceptu nian lingvon oficiale kiel mondolingvon, tio ja havas gravajn malhelpojn, sed ĉi tie, en nia regiono, tio estas necesa kaj reala postulo. Nia gazetaro devus peni por la disvastigo de Esperanto por nia propra intereso. Esperanto estas ja fleksigema kaj eleganta esprimilo. Li finis sian paroladon per la ripeta konstato, ke la libera nordo servas same la interesojn de ĉiuj grandpotencoj, ĉar tio signifas al ili firman bazon por la interkompreniĝo reciproka.

Profesoro B. Collinder.

Prof. B. Collinder estis la dua prelegisto. Ankaŭ lia varme akceptita prelego estis svedlingva. La titolo de la prelego estis: "En översikt över Östersjöområdet språkfråga" kaj ĝi donis interesajn informojn koncerne la komplikajn lingvorilatojn en la baltika regiono. I. a. li pritraktis la rilatojn inter la sveda kaj finna lingvoj kaj konstatis, ke, kvankam temas pri du, tute ne parencaj lingvoj, dum la longa kunvivado la formado de la lingvoj montras similajn trajtojn, tiel ke el tio sekvas paradokso, t. e. ke la finna lingvo nun estas en multaj rilatoj pli proksima al la ne-parenca sveda lingvo, ol al sia suda parenco, al la hungara lingvo.

La konkludo de la prelegisto estas, ke la granda nombro de vivantaj kaj vivkapablaj lingvoj — kun valora literatura produkto — necesigas tian internacian lingvorimedon, kies funkciado ne malutilus al tiuj valoraj naciaj produktoj. Kaj el tio sekvas la motivita deziro koncerne la funkciigon de Esperanto kiel oficialan helplingvon en la ĉirkaŭbaltikaj landoj.

*

Post la prelego de s-ro Collinder la partoprenantoj havis agrablan kuneston en la salono de "Margareta Hushällsskola", kie la sindiko, s-ro Morariu, faris interesan paroladon pri "la ekzistrajto de la malgrandaj popoloj". La homo estas libera laŭ natura stato kaj la sama principo devus valorigi en la vivo de la popoloj. La rajto de la malgrandaj nacioj por vivo inter egalaj kondiĉoj ne estas pridubebla. Li mencias la svisan ŝtatformiĝon kiel modelan. En aliaj landoj, ekz. en la Baltiko, kiu estas renkontejo de la malgrandaj lingvoj, Esperanto devas havi sian rolon. Li mencias la problemaron de la pli sudaj popoloj, speciale tiun de la rumanoj, pri kiu li citas eldiron de verkisto: "La rumanoj havas la kuraĝon fali, ĉar eĉ dum falo oni povas direkti sin tiel, ke oni falu sur la piedojn." Malgrandaj popoloj devas suferi, espereble por fine atingi pli feliĉan staton. Pri la milito la malgrandaj

popoloj plej ofte ne mem decidas, sed la cirkonstancoj de la grandŝtata politiko devigas ilin batali.

Nun sekvis salutvortoj: rektoro Vilkki transdonis salutajn el "Suomujo" (laŭ sia propono). Dro F. Szilágyi en siaj salutvortoj memorigis la ĉeestantojn pri la pioniraj meritoj de Fritz Lindén koncerne la paclaboron. Ing. F. Turner estis reprezentanto de la angla popolo. Sekvis la salutoj de s-roj Bepperling, Nylén (entuziasme aplaŭdita pro la gajno de la Larsson-premio), kaj la lasta parolanto estis Stellan Engholm, kiu tuŝis la problemon de la homa moralo, popola moralo kaj agado de la ŝtatoj. Li resumis la atendeblajn rezultojn de la bela manifestacio: ni ne povas ŝanĝi aŭ direkti la okazaĵojn, sed la entuziasmo kaj intereso, se ĝi restos daŭra, havos efikon.

La "Espero" finis la belan vesperon.

*

Matena Diservo.

Post "rapida" dormo granda parto de la konferencanoj — laŭ la invito de la KELI-organizo, partoprenis Diservon, kun varma amo aranĝitan. La Diservo okazis en la Valhalla-preĝejo. S-ino Anna Alamo donis esprimon al la ĝojo de la aranĝantoj pro la grandnombra partopreno. D-ro Georg Fridén ekiris en sia prediko el la Matea evangelio (2:1—11) pri la rakonto de la ŝaĝuloj, kiuj forlasis sian hejmon komfortan, por esti gvidataj de la betlehema stelo. Inter aliaj ankaŭ Zamenhof estis tia ŝaĝulo, kaj ni esperantistoj sekvu tian kaj tiajn ekzemplojn. La bela vizio pri la unuigita homa familio postulas longan vojon kaj penon, sed por ĝi ni preĝas kaj pri ĝi ni esperas. S-ino Dagmar Fridén kantis "Herden spelar för barnet Jesus" (Alice Tegnér) kaj "Vid Betlehem" (Jacob Nyvall).

Prelego de rektoro Vilkki.

Je la 10-a horo komenciĝis la tre interesa prelego de s-ro Vilkki, kiu pritraktis la specialajn vidpunktojn kaj sentojn de militanta nacio. Estas nature, ke tiuj vidpunktoj kaj sentoj estas specialaj en militanta lando kaj la publiko aŭskultis la prelegon jen komprene, jen kun plaĉo. Li komencis per la historiaj antaŭaĵoj de la nuna milito kaj parolis pri la konstanta bastiona rolo de sia nacio en la historio de Nord-Eŭropo. Sekvis priskribo de la ĵus ekiĝinta situacio kaj priskribo interesa de la hejma fronto: "Nia ekonomio tute ne ŝanceliĝas... la nutra stato estas kontentiga, malsatego ekzistas nenie... la militelspezoj estas malpli grandaj ol la elspezoj de Svedlando por la neŭtraleco."

Diskutante pri la sinteno de diversaj nacioj kun danko li menciis la help-agadon kaj la komprenemon de la svedoj kaj doninte esprimojn al la persistemo de la popolo la prelegisto parolis pri la pacdeziroj kaj diris, ke la "suomoj volonte montros al la tuta mondo, ke ankaŭ en kulturlaboro ili povas fari multon dignan", se la kulturmondo povos garantii la sekurecon de la lando. Oni povas en sia imago aperigi la revon pri la unuigita kaj unueca Eŭropo kaj pri la rolo de Esperanto en ĝi, sed provizore ĝi estas malproksime. Sed la unueco de la nordo estas multe pli reala penso, al kiu li esperas la komprenon de la svedoj. "Svedujo estas la koro de la Nordo, sed koron minacas grava danĝero, se kelkaj membroj jam estas paralizitaj."

S-ino Alide Kuld-Leijder.

Post la "durtona" bele formita parolado de s-ro Vilkki, sekvis "baltika romano en molo". Kiel la antaŭa, ankaŭ tiu ĉi parolado estis esperantlingva, ĝia prezentanto estis s-ino Alide Kuld-Leijder (Tallinn) kaj la temo estis "la sorto de Estonio, Latvio kaj Litovio". Estis interesa prelego. La raportanto supozeble ne eraras dirante, ke kaj la prelegisto kaj la publiko estis kortuŝata dum la sonigo de tiuj milde konceptitaj kaj mole prezentitaj frazoj. Oni vidis antaŭ si la kruelan estinton de malfeliĉaj etaj popoloj: "Oni aŭdas ofte, ke la estonoj ĉiam suferis subiĝon. 22-jara libereco ne estas preparolinda. Ho jes, tio estas sufiĉe multe por preparoli. Tio estis la plej feliĉa tempo de la estonoj, pri kiu ili revis dum 700 jaroj..." Oni aŭdis pri la historio de malgrandaj popoloj, persistaj, ne flankiĝeblaj kun fruaj faktoj de kulturklopodoj kaj pri la bela laboro dum la mallonga mem-

stareco. Kaj ne-laste oni aŭdis pri la iam famaj kaj nun malpermesitaj Esperanto-organizoj.

Ingeniero F. Turner.

La lunĉpaŭzon sekvis la prelego de s-ro Fred Turner (London) pri la "Atlantika deklaro kaj packondiĉoj". Ankaŭ tiu esperantlingva parolado kontribuis al la varico de la serio. Oni aŭdis sonojn de simpatia optimismo, interesajn komentojn kaj trafajn rimarkojn, el kiuj la jena persona rezultis tujan aplaŭdon ĉe la publiko: "Ne tio estas malbona, ke Germanujo ne havas koloniojn, sed tio, ke Anglujo havas tiajn." La pesimismon de multaj li karakterizis per la konstato, ke tiu, kies dento doloras, ne pensas pri la poezio, kiel pri io grava." Sed poezio tamen ekzistas. La efekto de la interesaj kaj metodaj komentoj estis koraj aplaŭdoj; oni ekkonis interesajn vidpunktojn kaj sentis sin pli riĉa.

En la diskuta parto F. Szilágyi faris — poste akceptitan — proponon, kies realigo apenaŭ dependas de la diversaj ŝancoj de la estontaj packontraktoj: "La estraro de SEF, respektive la internaciaj organizoj laŭeble en kunlaboro serĉu la eblecon eldoni ĉiujare ampleksajn kulturinformilojn, (t. e. revuojn) unufoje dum la jaro. Unu el tiuj kulturjarlibroj rilatu la literaturon kaj la kulturrezultojn de la ĉi tie pritrakitaj nordaj ŝtatoj, resp. popoloj."

Post la alparolo de urbestro Lindhagen laŭ lia iniciato la ĉeestantoj kriis kvar-fojan huraon je la libereco de ĉiuj popoloj sur la terglobo.

Direktoro Khennet pledas por federacio de nordaj ŝtatoj sen la plej eta tendenco de agresemo. La ŝovinismo en ĉiu formo estas kondamninda, malutila.

S-ro Fingholm klarigas la signifon de la konferenco, kiu prenis parton de la problemoj universalaj. Oni aŭdis vidpunktojn, provizore oni ne povas fari multe, sed konservu, pligrandigu la Esperanto-movadon kaj en la konkreta momento oni povos estigi i. a. internacian popol-altlernejon kaj serĉi publikon en la popolmovadoj, kies internaciaj interesoj necesigas Esperanton.

Post la alparoloj de s-roj Skog, Lindén, s-ro Vilkki korektis kelkajn miskomprenitajn vortojn.

S-ro Backlund faris kelkajn klarigajn rimarkojn koncerne la aŭditajn prelegojn kaj prezentis rezolucion laŭ la jena teksto:

Rezolucio.

La konferenco "Popoloj ĉirkaŭ la Orienta Maro", aranĝita de SEF kaj IEL kaj kunveninta la 5-an kaj 6-an de jan. 1944 en Stockholm por plifortigi la interrilatojn per persona kontakto al prelegistoj el diversaj landoj, esprimas sian kontentecon pri la principoj, kiuj esprimiĝas en la Atlanta Deklaracio, rilate al teritoriaj rajtoj, la decidraĵo de popoloj, mondkomerco kaj alia internacia kunlaboro, libereco de la maroj kaj liberigo de la popoloj de timo kaj mizero.

La konferenco volas rememorigi ankaŭ tiun averton, kiun dro Zamenhof en 1915 direktis al la diplomatoj de la diversaj landoj en la mondo., t. e. ke en ĉiu lando oni konsideru la rajtojn de la tie troviĝantaj minoritatoj, kies ekonomian aŭ spiritan subpremon oni evitu, same kiel ilian malhonorigan traktadon flanke de la popola plimulto.

Ĉe la Orienta Maro, pro la ege diferencaj, multaj popoloj, kulturoj, lingvoj tie — la enkonduko de internacia lingvo estas neceso, speciale por la malgrandaj Orientmaraj popoloj, se ili intencas proksimiĝi unu al la alia kaj apogi unu la alian en siaj klopodoj por la libereco.

La konferenco alvokas la estraron de SEF fari tiun iniciaton, kiu estas bezonata por ke la kultur-interŝanĝo de la Orientmaraj popoloj plifaciliĝu per Esperanto.

La konferenco akceptis la rezolucion.

Kaj la 6-an de januaro post la 17-a horo oni sentis sin laca, sed multe pli riĉa je scioj kaj belaj memoroj. La konferenco estis brava faro!

La sciigantoj.¹⁾

Mihail Sadoveanu.

Estis du knaboj etaj kiel pugno, kun egaj peltĉapoj ĝis sur la okuloj, kaj enpakitaj en lanjako kun longaj manikoj. Kvankam ili ekiris tagmeze, estis ankoraŭ longa la vojo, ĝis vilaĝo Viiŝoara, longa kaj malfacila, tra la neĝo, kaj nun, malfrue, ili pene trenadis la sandalegojn vinditajn per pajlo.

Dum la kristnaska festo jene iradis la knaboj kun la stelo, al la pli riĉaj vilaĝoj. Ankaŭ ili ricevis kuraĝon, kaj ekiris kun la stelo tra la kampoj, tra la glacia ponto de Siret²⁾, al la valo kolormakulita de sennombraj dometoj de l' viiŝoaranoj. La vesperkrepusko metis dubebluan ombron sur la senmovan neĝvaston. Kaj ili pene iradis; ili ĵus finis la interparolon kaj kvazaŭ ne plu kuraĝis rigardi unu al la alia. La sonorileto de la paperstelo de tempo al tempo eksonis super ili. Ili levis siajn kapojn kaj elrigardis de sub la randoj de l' peltĉapoj al la horizonto. Nenio estis videbla. Ili apenaŭ proksimiĝis al Siret.

En la spegulego de l' rivero ekstremis la lumeroj de la supraj steloj. Kaj profunda silenco regis, kvazaŭ ŝtoniĝis la nigra senarbejo, preter kiu ili pluenŝovis sin, irante laŭlonge de la bordo. La sandaloj akre sonis sur la glacio. Ili reciproke ĉirkaŭbrakis la ŝultrojn kaj malrapide pasis transen, sur la brila plataĵo, tra la mistera silento de la vesperiĝo.

Suririnte la alian bordon, ili ekhaltis, rigardante antaŭen. La vilaĝo ne estis rimarkebla. Ili turnis sin unu al la alia. La lipoj de la pli malgranda ekstremis.

"Oni nenion povas vidi!" murmuris la pli granda. Kaj la voĉo de l' etulo plore sonetadis:

"Ni erarvojaĝis. Kion ni faru nun? La lupoj manĝos nin..."

La granda malfacile englutis la ploron kaj diris:

"Jonika³⁾, ankaŭ paĉjo-maljunulo⁴⁾ diris, ke foje lin kaptis neĝblovado kaj li iris antaŭen, kaj li savis sin..."

"Al mi estas malvarme!" balbutis la malgrandulo.

"Enigu viajn manojn en la manikojn, bone, — kaj kunigu ilin sub la mentono. La stelon portos mi. Kiam ni alvenos, ni kantos kaj petos iun, ke li gastigu nin dum la nokto."

"Ĉu vi estas malsata?"

"Jes."

"Oni donos al ni ankaŭ manĝaĵon. Sed vi kantu bone! Ĉu vi ne forĝesis 'Tri Reĝoj'?"

"Mi ne forĝesis", respondis la etulo sorbspirante per la nazo kaj retenante sian ploron.

1) Laŭ kutimo en Rumanio, kristnaskan vesperon infanoj vestitaj je Tri Reĝoj kaj Herodo iradas de domo al domo portante lumigitan paperstelon, por prezenti la historion pri la naskiĝo de Jesuo.

2) Siret: rivero en Moldova, Rumanio.

För att bereda dem, som ännu ej haft tillfälle att skaffa sig den ypperliga boken

"50 jarojn kun Paul Nylén"

möjlighet härtill ha vi beslutat att å den del av upplagan som ännu återstår

NEDSÄTTA PRISET FRÅN KR. 4:—

TILL KR. 2:—

(vartill kommer oms. och porto).

Boken, som i korta drag skildrar den svenska esperantismens utveckling under de senaste 50 åren, är med sina över 100 illustrationer ett värdefullt förvärv och bör ägas av varje esperantist.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO
Fack 698, Stockholm 1. Postgiro 578.

Ili marŝis pluen en la griza lumo de l' vespero. Antaŭ ili, post ili, neĝa dezerto; ŝajnis, ke la malvarmo kreskas kaj la neĝo akre grincis sub la sandaloj. De temp' al tempo ili haltis dum momento, kun timiĝintaj animoj, provis trapenetri la ombron, kiu ĉirkaŭis ilin, esperante, ke ili ekaŭdos brusignon pri homa vivo. Foje, en tiuj intertempoj estis aŭdebla la akra grakado de l' korvoj, miksitaj kun la malforta krietado de la monedoj, malproksime, kiu scias super kiu senarbejo. Sed tiu ektimo rapide pasis. Ili iris pluen en silento, ĉiam pli eniĝante en la mallumon, kaj retenante la ploron per streĉitaj makzeloj. Tiel ili penetris tra la nokto, kvazaŭ la frostotremiga soleco estus doninta forton al ili. En iliaj infanaj kapoj, tie, sub la ŝafpeltaj ĉapoj, resonis la sanktaj kantoj pri la naskiĝo de la Savinto. Pensante pri tiuj, ili pensis ankaŭ pri la varma kuŝejo, ankaŭ pri la vespero de la manĝaĵo en la vilaĝo, kien ili ekiris. Ili nek la misteron de tiu vespero povis bone kompreni, nek la kantojn altigotajn per iliaj puraj voĉoj, tamen ili portis sciigon gravan, kun la stelo, sub kiu ili kurbiĝis, levante siajn ŝultrojn kaj kunpremante sub la mentono la menikojn de la peltjakoj.

Por la malgranduloj kaj humiluloj, por ke iliaj animoj esperu kaj konsoliĝu, foje aperis stelo kaj naskiĝis ideto, kiu pli poste plenigis la mondon per la lumo de l' boneco. En humileco naskiĝis la sankta infano, humiligite li vivis, humile li portis la krucon al la ekzekutejo preparita por li de la malbonuloj; pro la aro de malriĉuloj li mortis. Sed en la animoj de la malgranduloj de tiam brilis senĉese la lumo de la kredo je pli bonaj tagoj, — kaj tiun esperon iris sciigi la du infanoj, sen konscio pri tio. Ili iris kun siaj kantoj, kun sia stelo, por plenigi per bonvolo la korojn de la homoj, kaj ili iradis, frostotremante kaj ĝemante tra la vintra nokto, — kaj super iliaj kapoj la sonorileto dolĉe tremsonis.

"Jonika, ĉu vi frostas?" demandis Vasile, la pli granda.

"Miaj manoj rigidiĝis ĝis la kubuto...", ekĝemis la etulo.

Ankaŭ la pli granda sentis malvarmon kaj tenis ĉirkaŭbrakita la tenilon de la stelo kiel lamulo, ĉar siajn manojn li ne povis uzi. Liaj larmgutoj fluadis pro doloro, malsekigante la okulokavojn.

La etulo diris:

"Kion ni faros, ĉar la vilaĝo nenie vidiĝas?"

"Nun tuj ni rimarkos la lumojn de la fenestroj", respondis Vasile.

"Sed se ni erarvojaĝos? Aperos la bestegoj."

"Tiam ni preĝos al Dio kaj li savos nin de ili."

En tiu ĉi soleco, al ambaŭ, la vorto "Dio" havis specialan resonon, tute alian, ol en la preĝoj vente diritaj vespere kaj matene. Estis io mistera, kion ili ne povis trapreni.

Kaj ili penetris pluen, — ŝajnis al ili, ke ili migradis sennombrajn horojn; la malgrandulo ofte direktis al la alia kelkajn vortojn kun timigita voĉo; ili malofte turnis sin duone, rigardante unu la alian kaj vidante sin nigraj, kiel ombroj. Kaj nur tre malfrue la humilaj sciigantoj ekvidis la lumstelaron de l' vilaĝo ondante el la mallumo, — kaj kiam ili enpaŝis la stratetojn ĉirkaŭitajn de nigraj bariloj, ŝajnis al ili, ke la frostotremiĝis. Dum furioza bojado de hundo ili eniris korteton. Vasile per bastono ŝirmis la stelon, — kaj la sonorileto timvoĉe eksonis ĉe la fenestroj.

La pordo de la granda domo ekbrulis, poste malfermiĝis la ekstera pordo kaj ĉe la sojlo aperis nudkapa vilaĝano.

3) Jonika = Johaneto, Joĉjo.

4) "Paĉjo-maljunulo" = avo.

Prozo el Danaj-Norvegaj aŭtoroj.

16 skizetoj, fabeloj, rakontoj ktp.
Eldonitaj en Kristiania (Oslo) en la jaro 1908.
Restas nur kelkaj ekzempleroj.

Prezo inkl. imposto kaj afranko
kr. 1:50.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO
Fako 698, Stockholm 1. Poŝtgiro 578.

"Ĉu vi akceptas stelulojn?" demandis Vasile.

Lia voĉo estis tiome malforta kaj timtremanta, kaj la etulo tiom rapide ekĝemis, supersŭtita de larmoj, ke la viro kortuŝite kliniĝis al ili.

"Vi ne estas de tiu ĉi vilaĝo, aĉuloj, — he?"

Poste li kriis al la hundo: "Hi, fiulo! — kaj vi, etuloj, eniru do la domon. — Edzino! malfermu la pordon, por ke envenu la stelo... Tiel... ĉu vi estas homoj, aŭ glacipecoj? ... Singarde, por ke vi ne albatu la stelon al la pordosupro..."

La frostitaj sandaloj de la knaboj bruis kiel botoj. Ili eniris la domon; la stelo milde kaj gaje sonoretis: cingling!

La domestro, juna homo, proksimume tridekjara, largdorsa kaj plenforta, rigardis ilin kvazaŭ miraklon.

"De kie vi estas, knabetoj?"

"De Bordeeni", respondis la granda.

La lumo kvazaŭ blindigis ilin kaj ili preskaŭ fandiĝis pro la varmo.

"Demetu viajn suraĵojn, bravetuloj", diris denove la viro.

Vasile singarde demetis la stelon apud la ikonoj⁵ kaj komencis devestigi sian fraton. Læ edzino, maldiketa kaj ankoraŭ juna, leviĝis de la tripieda tableto kaj rigardis ilin mirigite, kun la manoj ĉe la kokso.

"Vi havas bonŝancon!" ekparolis denove la mastro.

"Ĝuste nun ni estis ekmanĝontaj. Ankaŭ vi manĝos kun ni, ĉar ni ja havas sufiĉe, dank' al la Sinjoro! Sed unue vi kantu al mi, ĉu vi komprenis?"

La etulo ankoraŭ ploretadis. — La viro turnis sin al la kameno.

"Sed kie estas Gica⁶? He, friponeto, venu malsupren! kial vi forkuris? ne timu, ili ne manĝos vin, ankaŭ ili ja estas knaboj kiel vi..."

Ĉe la kamentubo aŭdiĝis murmureto, poste blonda kapeto kaj fingro bore ludanta en la nazo, montriĝis en la lumo.

"Venu tien ĉi", diris la patrino, kaj ekprenante liajn manojn, ŝi tiris kaj portis lin en la mezon de la ĉambro, apud la tableto, sur kiu vaporis la supo kaj la maizaĵo. La infano, nur dujara globeto, timeme rigardis la venintojn kaj nodiĝinte sur la tero, li retiradis la maneton, kiun tenis lia panjo.

La mastro returnis sin al la steluloj:

"Ĉu vi finis? Nun antaŭ ĉio senfrostigu la manojn.

"Do, vi estas el Bordeeni? Kaj kies infanoj vi estas?"

"La filoj de Jon⁷ Balaŝei", respondis la granda.

"Mi ja konas lin!" diris la majstro. "Kaj kiel li lasis do vin eliri en tia frostot?"

"Ni mem ekiris solaj."

"Kaj ĉu vi ne timis la lupojn?"

La infanoj ne respondis. La mastro ridetante rigardis ilin. Poste li denove demandis:

"Sed ĉu vi scias, kio okazis en Betlehemo? Kantu do al mi tiun kanton pri nia Sinjoro Jesuo.

"Ni scias ĝin!" respondis rapide Vasile.

Ili ambaŭ alproksimiĝis al la sanktulbildoj, levis la stelon sub la lampeto konstante brulanta, iom skuettis ĝin, kaj la sonorilo eksonis. Poste ili levis la okulojn al la lumokrono ĉirkaŭanta la kapon de la Dipatrino kun la ideto ĉe la sino, kaj ekkantis kun puraj voĉoj:

"Tri Reĝoj de Oriento
Vojaĝantaj kun la stelo..."

Kaj ankaŭ la domestro rigardis al la ikonoj kun okuloj nebulitaj de pensoj, kaj la knaboj kantis kun altsonaj, molaj voĉoj, kun koloj alte levitaj. Ili ĉesis momenton, glutis kaj ree ekkantis, anoncanta la naskiĝon de la Savinto. La patrino prenis Gica-n en la brakojn kaj nun aŭskultis kvazaŭ trapenetrita de la mistero de tiu vespero kaj ŝiaj okuloj pleniĝis de larmoj. Kaj en la tuta domo regis trankvilo, kaj en la silento la voĉoj de la infanoj kantis la bonan sciigon. La fremduletoj tremante venintaj tra frostot kaj mallumo, kaj la nekonatoj, kiuj gastame malfermis al ili la pordon, nun sidis interfratiĝinte, kaj la simpla kanto plenigis la animojn per konsolo kaj lumo.

5) Ikono = sanktulbildo. 6) Gica = Georgĉjo.

7) Jon = Johano.

El la rumana tradukis Tiberio Morariu.

Mi vidas per sun!

(Säterjantans söndag)

Mi vidas per sun, ke hejme en val
preĝejtempo jam proksimiĝas.
Se estus mi for! Preĝeja la hal
atendas, kaj homoj kuniĝas.
Nun staras ĉe monta fendo la sun,
dum ĉi supre sole mi sidas,
en val sonorilo tonas ja nun,
la homojn preĝejen ĝi gvidas.

Nur vane en mia monta palac,
se psalmoj ĉielen leviĝus;
tro alta la hal, tro vasta la spac,
la tonoj aeren perdiĝus.
Jam li kaj aliaj kantas en ĥor,
kunkanti mi forte deziras.
Se nur la somero jam estus for!
Mi hejmen al valo sopiras!

(Laŭ "Esperantobladet", Oslo.)

Jakob Kristofferson mortis.

Meze de Advento, la ĝojpromesa antaŭtempo de Kristnasko, atingis nin tre doloriga komuniko. Letero al Grupo Esperantista de Stockholm sciigis al ni ke nia malnova amiko Jakob Kristofferson ne plu vivas. Post nur dutaga malsano la morto abrupte ŝiris lin el nia rondo. Akra estas la doloro, kiun sentas ni, liaj amikoj, kaj granda estas la malĝojo ke ne sciante pri lia morto ni ne havis eblecon sendi al li je la enterigo florkronon kiel lastan saluton.

Li, siatempe, efektivigis en la Stokholma grupo la iniciaton pri dimanĉaj promenoj aŭ ekskursoj. Ĉi tiuj ekskursoj ĝuis grandnombran partoprenon de la membroj, precipe de la gejunuloj, kaj ĝuste dum tiuj ekskursoj ni konatiĝis kun Jakob Kristofferson kaj lernis vidi en li bonan homon kaj fidelan amikon. Tamen ne longe ni havis la ĝojon de la kunestado kun li, ĉar li ricevis okupon en fabriko de eksplodaĵoj en Rio de Janiero. Tie li restis dum unu aŭ du jaroj, sed post kiam la fabriko estis detruita de terura eksplodo kaj li devis kuŝi en malsanulejo dum iom da tempo, li revenis al Stokholmo, kie li fondis familion, kaj ni povis renodi la ligilon de amikeco. Mallonge post la komenciĝo de la nuna milito li tamen transloĝiĝis al Mariestad, kie li ricevis oficon ĉe pulvofabriko. Kaj de tie nun venis la malĝojiga sciigo pri lia morto.

Dum lia forestado de Stokholmo ni ja estis ĉiam en pli malpli intima kontakto kun li pere de leteroj kaj poŝtkartoj sed nun, kiam tamen estas tro malfrue, mi ne povas ne fari al mi mem riproĉojn ke mi lasis aliajn aferojn malhelpi min per korespondado subteni pli fidele la interrilatojn kun li. Mem li ĉiam estis tre atenta kaj memorfidela. Eble ankaŭ aliaj liaj amikoj sentas la samon.

